

Christian Morgenstern,

## La anĝelo:

*tradukita de Willy Nüesch*

Ho se vi scius, kiom la vizaĝ'  
 ŝanĝiĝas, se vi meze en rigard'  
 silenta, pura, liga vin al mi  
 vin ene perdas, de mi turnas vin!  
 Kiel pejzaĝ', ankoraŭ hela ĵus,  
 nubiĝas ĝi, de vi elbaras min.  
 Atendas tiam ofte longe mi  
 silente. Se mi homus kiel vi,  
 mortigus min turment' pro amrifuz'.  
 Sed donis paciencon patr' al mi  
 senfinan, kaj neŝanceleble do  
 mi vin atendas, ĝis ke venos vi.  
 Eĉ ĉi riproĉon mildan prenu ne  
 riproĉo, sed mesaĝo ĉasta nur.

*Traduko de la Germana poemo "Der Engel:" de CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, \*1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de WILLY NÜESCH (Ettelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, \*1927-05-09).*

*Arg-143-286 (2004-03-01 08:38:32)*

*La tradukinto Willy Nüesch (Brückfeldstr. 11, CH-3012 Bern, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56) donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en mia interreta poem-kolekto „Argiope.bl0rg.net“. Li ankaŭ kontrolis tiun ĉi elpresaĵon kaj mi korektis tajperarojn laŭ liaj indikoj. Tiu ĉi lia traduko aperis en la literatura revuo "Fonto" n-ro 274 en Oktobro 2003.*